

Ankoraŭ pri la romano « La Litomiŝla Tombejo »
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 533, 1981.11.19 & 21

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Oni ne povas legi la romanon "La Litomiŝla Tombejo", sen unue intimiĝi kun la tre aparta lingvo de la aŭtoro, Karolo Piĉ. Tiucele notaro, sen kiu la libro estus simple nekomprenebla, alportas precizigojn kaj difinojn koncerne tricent sepdek unu glosojn. Se preskaŭ la duono el ili estas fakte personaj kaj geografiaj nomoj, la resto estas maloftaj vortoj de Plena Ilustrita Vortaro (45 glosoj), vortoj prenitaĵ el aliaj vortaroj, el gazetoj kaj el literaturaj verkoj (56 glosoj), 40 nekutimaj derivaĵoj kaj fine 64 neologismoj, kiujn Piĉ nomas novismoj.

A.- La pasintan semajnon ni legis al vi du fragmentojn el tiu neordinara romano, donante klarigojn pri la renkontitaj novismoj. Vi konstatis kiom originalaj estis la koncernaj priskriboj, kaj ke malgraŭ tre riĉa lingvo, ni diros tro persona lingvo, stile la verko estis tre agrabla, altira eĉ.

Cl.- Per novaj citaĵoj ĉerpitaj el la komenco de la romano, ni alportos al vi la vidpunkton de la aŭtoro koncerne la lingvajn demandojn, kiuj nepre ŝokos la plimulton de la legantoj kaj tre ofte fermigos al ili la libron. Jen ni citas:

A.- "Vi kaŭras ĉe la skribotablo. Ĝi plenas de slipoj, krajonoj, gumoj, paperoj kaj aliaj laboriloj. Plenas eĉ via dormdivano, la kaŭĉo.

C1.- **Kaŭĉo** estas divanlito ofte dismetebla.

A.- "Plenas eĉ via dormdivano, la kaŭĉo. Leksikonoj. Antaŭ ĉio la Ilustralo.

C1.- Karolo Piĉ helpe de la sufikso -al- formas aron da substantivoj, kiuj estas karakterizataj de la adjektivo el kiu ili formiĝis. Anstataŭ diri **Plena Ilustrita Vortaro** li ekzemple diras **Ilustralo**.

A.- Antaŭ ĉio la Ilustralo. Milkvarcentpaĝa vortaro latina. Vortaroj angla, franca, hispana, itala, portugala, germana, rumana, pola, serbokroata, bulgara kaj hungara. Kelkaj esperantaj-ĉeĥaj kaj ĉeĥaj-esperantaj vortaroj. Gramatikoj de la franca kaj latina. La Plena Gramatiko de Waringhien-Kalocsay kaj la Kompleta de Fruictier. Parnasa Gvidlibro. Milokcentpaga vortaro de la ĉeĥa lingvo. Lernolibroj de Ido, Esperantido, Occidental kaj Intal.

Cl.- Tiu ĉi lasta frazo estas tre signifa pri la lingva sinteno de Karolo Piĉ. Lia romano estas fakte pli ol beletra verko, ĝi ankaŭ estas interlingvistika eseo. Karolon Piĉ ne kontentigas la nuna vortprovizo kaj vortkonstruo de esperanto, kaj li eksperimentas. Sian vortkreatan esploron li tamen efektivigas kun granda respekto por la lingvo, kiun li intencas pliriĉigi, kaj li ĉerpas el pluraj fontoj: unue el la bazaj verkoj pure esperantaj, due el la latina lingvo, trie el nacilingvaj vortaroj kaj kvare el planlingvaj projektoj. Pri tiu ĉi eksperimentado jen signifoplena teksto de Karolo Piĉ. Ni citas ĉiam el la unua ĉapitro de "La Litomiŝla Tombejo":

A.- Febra serĉado en nacilingvaj gramatikoj kaj vortaroj. Kaj ne malpli aventura spionado en lernolibroj de aliaj planlingvaj projektoj. Ĉu ia Moliereska "je prends mon bien où je le trouve"?

C1.- "Mi prenas mian posedaĵon, kie mi ĝin trovas".

A.- Jes! Verŝajne! La prenado, tamen, ne facilas. Ofte vi serĉadas dum centoj da minutoj. Sovente pasas horoj intere.

C1.- En la Piĉa lingvo **sovente** signifas **ofte**. Kaj el prepozicioj kiel **inter** li ŝatas forĝi adverbojn kiel **intere**. Fakte la lingvo de "La Litomiŝla Tombejo" estas ege moderna, kiel tiu de Johán Valano.

A.- Sovente pasas horoj intere. Horoj en kiuj vi ne skribas eĉ unu solan vorton. Vi solvas problemojn dume. Jen vi parsolvas ilin.

C1.- En la Piĉa lingvo la prefikso **par-** esprimas kompletan plenumon, plenumiĝon. **Jen vi parsolvas ilin** signifas do: *Jen vi fine kaj komplete solvas la problemojn.* Persone ni tre bedaŭras tiun uzon de **par** kun tiu ĉi prefiksa signifo, ĉar en esperanto paro jam havas propran signifon, kiu neniel akordiĝas kun la Piĉa prefikso. La Piĉa finsolvo koncerne tiun ĉi problemon ne konvinkas la leganton.

A.-"Vi solvas problemojn dume. Jen vi parsolvas ilin. Jen vi devas retiri vin sensukcese. La solvoj ne maturas ĝise, aŭ simple ĝis nun ili ankoraŭ ne troveblas. Tamen, vi scias, eĉ sene oni vin atakos. Oni nomos vin reformemulo kaj dupo. Oni vin insultos. Oni trenados vin kote. Kaj oni vin propelos.

C1.- En la Piĉa lingvo la prefikso **pro-** signifas antaŭ, antaŭen, anstataŭ, vic. Ĝin inspiris la vorto prokonsulo. **Oni vin propelos** verŝajne signifas: Oni vin pelos antaŭen aŭ for. En la Plena Ilustrita Vortaro oni trovas la frazon "Li pelis antaŭ si tutan gregon da bovoj." Tiun ĉi zamenhofan frazon Piĉ verŝajne dirus "Li propelis tutan gregon da bovoj." Persone mi denove malfacile digestas por la elemento pro prefiksita uzon, kiu neniel akordiĝas kun la prepozicia signifo. Estas malfacile krei novismojn vivkapablajn. Tamen ni ne dubas, ke pro sia verkista talento Karolo Piĉ pli profunde influos esperanton, ol ni unuavide povas imagi. Leginto de lia libro tutcerte senkonscie asimilis pli ol unu piĉa esprimo. Estas interese ekzameni, kion opinias Karolo Piĉ pri la verkista tasko. Ni refoje citas el la unua ĉapitro de "La Litomiŝla Tombejo":

A.-"La verkado estas antaŭ ĉio granda tasko lingva. La poezio pli malpli jam elkreis siajn stilon kaj vortaron. La prozo, ankoraŭ, eĉ ne alpaŝis al preparlaboroj. Kaj tamen la definitivigo de Esperanto dependos unuavice kaj grandparte ĝuste de la esperanta romano. Ĉar nur la romano kapablos doni al la lingvo tiun vivantecon, kiun ne kapablas doni al ĝi la poezio. Sed tial la rolo de la esperanta prozo estas ege pli grava ol la paralela rolo de la prozoj nacilingvaj. Sur la naciaj pratoj la lingvojn kreas la popolo.

C1.- **Prato** signifas **herbejo**.

A.- "Sur la naciaj pratoj la lingvojn kreas la popolo. Sur la internacia, almenaŭ komence, la literaturo. Kaj jen pro kio vi verkas romanon. Kaj jen pro kio vi kunponas lingvistikajn studojn krome.

C1.- **Poni** signifas **meti, starigi**. "Kaj jen pro kio vi kunponas lingvistikajn studojn krome" estas iom peza frazo por diri tre verŝajne: "Kaj jen kial vi kunligas la verkadon de romano al lingvistikaj studoj."

A.- Pro tio, daŭrigas Piĉ, ke tiuj du aferoj koneksas. Strikte! Oni devas koni kaj regi la ilon, kiun oni uzas! Fino de la citaĵo.

C1.- Interesa kaj originala vidpunkto.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond parolis pri la interlingvistika signifo de la romano "Litomiŝla Tombejo" de Karolo Piĉ. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*